

Sud-Rejna Kuriero

Novembro
2014

Komuna inform-bulteno de Esperanto-Societo Basel kaj Mulhouse-Esperanto

N°56

Espace 110
FR-68110 ILLZACH
CCP 19684 F Strasbourg
mulhouse.esperanto11@free.fr



Esperanto Societo Basel
Postfach 178
CH-4005 Basel
esperantobasel@gmx.ch

Karaj membroj, karaj gesamideanoj, karaj legantoj,

En oktobro ni ĝuis ankoraŭ agrablan someran veteron. Ankaŭ okaze de Esperanto-aranĝoj, tiu vetero plezurigis la partoprenantojn, agrabligis la ekskursojn, kaj ampleksigis la sukceson en varma etoso.



Komence de oktobro okazis preskaŭ samtempe, migrado sur la Vogezoj, ferio-semajno en Katalunio kaj festivalo en Colmar.

Kaj semajnon poste la regiona staĝo en Sankt-Peter.

Intertempe ekfunkciis la kurso por progresantoj en Espace 110 kaj en Mulhouse Jacques sukcesis starigi eĉ du kursojn.

En novembro refoje okazos samtage "Bédéciné" en Illzach kaj "Justa komercado" en Ungersheim. Dank'al bonvolemaj deĵorantoj, ni supozeble refoje sukcesos partopreni en ambaŭ.

La ĉi-jaran Zamenhof-feston organizas la grupo de Bazelo. Vi trovos en ĉi-tiu numero la provizoran programon.

André Grossmann

| | | |
|--------|------------|--|
| Ĵaŭde | 23.10.2014 | Monata kunveno en Riehenring 131 Babilado kaj ludoj |
| Lunde | 24.11.2014 | Saint-Louis Babilado „La Fadeno“ ek de la 19a en la restoracio „La Poste“ en Saint-Louis |
| Ĵaŭde | 27.11.2014 | Programo en Riehenring 131 Ek de la 20a15 |
| Sabate | 13.12.2014 | Zamenhofa festo en Svislando. Programo kaj invito en ĉi-tiu numero |

Nicole Bérout

Aktualigitaj informoj aperos daŭre ĉe:

<http://mulhouse.esperanto.free.fr>

Niaj membroj ankaŭ estos informitaj per nia dissendo-listo:

mulhouse-esperanto@yahogroupes.fr

Por babili en Esperanto ni uzas jenan dissendoliston:

verda-babilejo@googlegroups.com

Enskribiĝo: verda-babilejo+subscribe@googlegroups.com

KOTIZOJ KAJ ABONOJ POR 2015-2017

La kotizo al Mulhouse-Esperanto inkluzivas sendon de nia loka bulteno **Sud-Rejna Kuriero**. Ĝi ebligas partopreni la aktivajn de nia asocio kaj donas la rajton voĉdoni okaze de Membro-kunveno.

Sed ankaŭ eblas aboni nian bultenon SRK sen membriĝo al nia asocio.

Jen ĉi-sube la kotizoj kaj la abonoj por la 3 venontaj jaroj.

| Jaro | Kotizo | Abono | Kolora ekzemplero |
|-------------|---------------|--------------|--------------------------|
| 2015 | 6,50 eŭroj | 6,50 eŭroj | 14 eŭroj |
| 2016 | 6,50 eŭroj | 6,50 eŭroj | |
| 2017 | 6,50 eŭroj | 6,50 eŭroj | |

Über das Englische gab es schon öfters Artikel. Dieses Mal geht es darum, dass viele Muttersprachler immer öfters englische Wörter in ihre Sprache einführen.

So drucken wir heute einen Leserbrief ab

Waadländer und Thurgauer, gleicher Kampf !

Unsere besten Glückwünsche an unsere Landesgenossen aus dem Thurgau, die das Englische dem Französischen endlich vorziehen. Sie haben verstanden, dass sie nur zu diesem Preis auf die Ebene der Waadländer gelangen können. Wo während Jahrhunderten das Französische unseren Wissenschaftlern, unseren Dichtern und Händlern genügt hat, um ihre feinsten Gedanken auszudrücken, genügt diese Sprache heute nicht mehr, um der schäumenden Kreativität ihrer genialen Benutzer zu entsprechen, und sie durchmischen sie mehr und mehr mit exotischen Wörtern.

Einige erfreuliche Beweise : Speedwings (private Jet Firma) planen einen Payerne Airport, unsere Ortschaften (in der Romandie) bieten ein Pully for Noise (Musikfestival) ein Tattoo (Militärmusik), ein Slow Up (autofreies Radfahren), Kidgames (Spiel- und Sporttage für Kinder), Swiss paintings (Malereiverkauf) und Pickup Flowers (Selbstpflücken von Blumen).

Die Namen von neuen Schweizern ausländischen Ursprungs werden nach englischer Art mit sh oder zh geschrieben. Unsere Produkte werden Swiss Cheeses und Swiss watches mehr oder weniger top, high tech oder sophisticate.

Die Teenagers, die Coworkers und borderline Leaders verlassen ihr Loft im Vintage Style, design und cosy, um ins Fitness oder ins Wellness, in Pub, ins Fast-food oder in den Take-away zu gehen. Auch lounges mehr oder weniger glamour kommen in Frage, um dem Stress und dem Burn-out zu entgehen.

Digitale Flyers kündigen Sales in den Showrooms oder Outlets an, bevor sie in Container geworfen werden.

Unsere Sprachen passen sich fröhlich den neuen Bedürfnissen an : shopping center, news, GEO, thriller, free-lance, look, workshop, sexting, sophisticate, lobby, DJ, badge, team, selfie, littering, award... Jeden Tag bringt ein Paar Neuigkeiten.

Swissness ersetzt auf vorteilhafterweise das Schweizerische.

(aus 24Heures, Lausanne)

Zamenhof-festo

La ĉi-jaran Zamenhof-feston organizas la grupo de Bazelo. Same kiel en 2013 la grupo proponas komunan tagmanĝon anstataŭ vespermanĝon. La unue planita vizito al Novartis estas prokrastita, pro meteologiaj kialoj, ĉar la ĉefa parto (2 horoj) de la vizito estos ekstere. Tial prefere okazigi la viziton en pli varma periodo. Bonvolu trovi ĉi-sube la inviton kaj provizoran programon.

INVITO al Zamenhofa festo 2014 en Bazelo kaj ĝia regiono Provizora programo

sabate la 13a de decembro 2014 ek de la 11a

Programo :

- 11a00** **Rendevuo ĉe la ĉefpordo de la preĝejo Claraplatz, Kleinbasel, en rekta linio al la Mittlere Brücke**
- 11a15** **Vizito de Musikmuzeo (Drehorgel) en Basel kun ĉiĉerono en la germana kaj en Esperanto**
- 12a30** **Rondirado tra la Krisnaska bazaro sur la Claraplatz**
- 13a00** **Forveturado al Weil/Haltingen por**
13a30 **Tagmanĝo en Saigon Palast :**
- 15a** **Posttagmeza programo**
- 17a** **Fino de la renkontiĝo**

Bonvolu elekti unu manĝon kaj informi min

Rete : Focke-Inzlingen@t-online.de

Telefone : 0049/7621/45712

Ĉiuj menuoj estos servitaj kun antaŭmanĝo :


Frühlingsrolle, vegetarische Frühlingsrolle,
Salat oder Pekingsuppe.

| | | |
|-----|-------------------------------------|---------|
| M21 | Ente süss-sauer | (7.90E) |
| M22 | Ente 8 Kostbarkeiten | (7.90) |
| M12 | Hühnchen Chop Suey | (6.80) |
| M20 | Fischfilet süss-sauer | (7.50) |
| C62 | Schweinefleisch Szechuan | (10.90) |
| M4 | Buddhistische Fastenspeise mit Tofu | (6.50) |

Printempa rulaĵo, vegetara printempa rulaĵo
Salato aŭ Bejinga supo

| | | |
|-----|--------------------------------|-----------|
| M21 | anasaĵo dolĉ-acida | (7.90 €) |
| M22 | Anasaĵo + preciozaĵoj | (7.90 €) |
| M12 | Kokaĵo Chop Suey | (6.80 €) |
| M20 | Fiŝfileo dolĉ-acida | (7.50 €) |
| M62 | Porkaĵo Szechuan | (10.90 €) |
| M4 | Budista fastad-manĝo kun Tofuo | (6.50€) |

Nicole Bérout



Ni Esperanto-amikoj el la najbaraj landoj Germanio kaj Francio ŝatas migri kune en bela naturo limproksime. Jam longe antaŭe oni parolis pri la dua BAVELO-migrado ĉijara okazanta en la Vogezoj. Sabaton, la 4an de oktobro 2014, ni renkontiĝis ĉe la „Blanka Lago“ (Lac Blanc) por la anoncita „Kvarlaga Migrado“. Malbrilis unue la vetero. La fru-aŭtuna tago, certe suna en la altaj tavoloj super la antaŭtagmeza grizo, logis entute 14 personojn al la 14 kilometrojn longa Esperant-amika ekskurso.

Nevole estis du grupoj komence. Pro raliaj survoje unu aŭto alvenis tutan horon malfrue. Tiu kvaropo elektis mallongigan kromvojon, por je la tria lago kunveni kun la aliaj partoprenantoj.

Alternis ŝtonaj, krutaj kun agrablaj padoj al la pinto de la monto „Gazon du Faing“, 1300 metrojn alta, la plej alta punkto de nia migrado. Bela elrigardo al la aliaj Vogezopintoj rekompencis nin post la pena suprenvojo. Bernhard Reiffsteck konis la nomojn de ĉiuj pintoj.



Ni ekis plu-migri, nun krute malsupren al la „Lago de Trutoj“ (Lac des Truites), kiu situas 1060 m alte. Dum ripozo, nun en aŭtuna suno, ekestis intensa diskutado pri tio kaj jeno. Ni sentis nin komfortaj per nia komuna lingvo Esperanto. Dume ni manĝis la kunprenitajn manĝaĵojn, pluraj el ni disdividis manĝaĵojn inter si. Ni ĝuis la grandiozan elrigardon trans la lago kaj al la ĉirkaŭaj krutaj deklivoj. La mirinda naturo instigis nin, elvoki el la memoro la nomojn de diversaj plantoj kaj bestoj troveblaj ĉi tie kaj komparis ilin en la tri lingvoj. Ĉevaloj pace paŝtis sin proksime, azeno henis de tempo al tempo korŝire, ni amuziĝis ĝuante la naturon. Post sufiĉe longa ripozo ni decidis rezigni pri la sekva, la kvara lago, la „Verda Lago“ (Lac Vert) – ĝi estu celo de alia venonta komuna migrado.

Tra herbejoj kaj arbaroj la vojo gvidis nin finfine al la „Nigra Lago“ (Lac Noir). Tie renkontiĝis la du grupoj je plursona ĝojvoĉa hejo kaj holao, kisetoj kaj brakumado. Jen ankaŭ la malgranda, unujara Julia kaj ŝia hodiaŭa, ĉi-okaza „honora avino“ Inge, kiuj estis evitintaj la lacigan vojon por pli komforta infanvartado, je avantaĝo kaj de la bebo, kaj de la patrino kaj de la vartantino. La kunorganizanto Engelbert Sester nun regalis nin per kunportita dolĉa freŝa pomsuko (ankoraŭ ne fermentiĝinta). Kelkaj el ni frandis nun glaciaĵon, rekompence post la fortostreĉa „montogrimpado“ kaj kvazaŭ honore al la „someruno“ (somer-aŭtuno), ĉar la somero plejparte malbelis kaj la aŭtuno nun ore belas.

Informtabulo klerigis nin pri la „pump-storeja centralo“, kiu ligas du lagojn diversnivele situantajn (Nigra Lago, 955 m alta, kaj Blanka Lago, 1055 m alta) tiamaniere, ke la superflua nokta elektro uziĝas por pumpi akvon de malsupre supren, por ke tiu akvo povu denove generi elektron dumtage, kiam estas pinta energi-bezono. Ĉar jam en la pasinta BAVELO-migrado temis pri akvo-energio, jen jam ruĝa fadeno de klerigada serio pri aktuala problemo.

La revojo al la Blanka Lago pli komfortis ol la antaŭa vojparto. Kvazaŭ por festfina rondo ni kunsidis en la gastejo „L'Auberge – Le Mille Mètres“. Regis inter ni kontenta kaj familia etoso.

Jam du semajnojn poste pluraj el ni renkontiĝos denove en la BAVELO-Seminario en la Nigra Arbaro.



La 22-a Internacia Esperanto-Semajno de la kulturo Kaj Turismo en Cap-Salou, Katalunio



Ĉi-jare la fama oktobra semajno en Katalunio arigis pli ol 140 partoprenatojn el 14 eŭropaj landoj. Ĝi okazis en antaŭ-urbeto de Salou, nome Cap Salou, sude de Tarragona en bona kaj tute proksime de la strando. En la hotela restoracio ni ĝuis bufedajn manĝojn ege abundajn kun hispanaj vinoj.

Dimanĉe okazis la solena inaŭguro de la Semajno en ĉeesto de la urbestro, Pere Granados Carrillo, kiu bonvenigis la ĉeestantojn kun interesaj klarigoj pri la urbo. Tradukis Francesc Inglada.

Pli poste ekster la hotelo apud la naĝejo okazis komuna fotado en lia ĉeesto.





La diversaj programeroj de la semajno okazis en tute aparta salono de la hotelo. Rodica Todor el Rumanio sukcesis tre lerte laborigi la progresantojn. Ŝi proponis al ili krei diskutgrupojn, por debati pri la temo "Esperanto - Ponto inter kulturoj en multlingva, pluretna socio" laŭ la principo FLAM-analizo. "Fortoj-Lamaĵoj-Avantaĝoj-Minacoj". La diversaj grupoj serioze diskutis pri la temoj, poste reprezentantoj prezentis al ĉiuj la sintezon de la diskutoj. Dume Thierry Saladin gvidis per rekta metodo la komencantojn.

Okazis prelegoj pri la fama rusa verkisto A. Puŝkin "La neĝo-ŝtormo" fare de Gian Carlo Fighiera. Pri Nepalo montris bildojn Liba kaj Floreal. Marcel Delforge parolis pri sia vivo, plena je vojaĝoj kaj interesaj spertoj.

En la semajno okazis du interkonaj vesperoj kun multaj frandaĵoj, ĉampano. Krome sin lerte prezentis partoprenantoj el diversaj landoj. Estas ankaŭ okazo montri sian lertecon por trinki el speciala botelo "Porron".



Okazis dum la semajno 2 duontagaj ekskursoj kaj unu tuttaga ekskurso. En la grotoj de Maravelles en Benifallet eblis admiri stalaktitojn kaj stalagmitojn, kiuj konservis tra la jarmiloj diversajn interesajn formojn. Neniu uzis tiun groton dum tiu ege longa periodo.

Bedaŭrinde ne eblis foti tie.

La tuttaga ekskurso estis tute agrabla. De la urbo Amposta ni ŝipveturis sur la rivero Ebro ĝis la maro. La vetero estis tute somera en trankvila pejzaĝo ambaŭ-flanke de la rivero. Revene ni havis tempon por nia piknikaĵo, ĝui bieron kaj gustumi osmerojn.



Aparte ŝatata estis la ensemblo "Montjuic" kataluna grupo, kiu interpretas havanan muzikaĵon.

Samvespere eblis gustumi "cremat" (bruligita rumo kun kafo-spicaĵoj kaj aliaj). Ĉiu partoprenanto ricevis ceramikan taseton kun la nomo de tiu semajno.

La dua duontaga ekskurso ne povis okazi laŭplane pro teknikaj kialoj. Dume alia grupo preferis pied-ekskursi al lumturo kaj ĝui la marbordon.



Fotoj kaj teksto de Andreo



Ĉe la fino de la semajno ni debatis pri la pozitivaj partoj kaj plibonigendaj eroj de tiu semajno. Multaj estis tute kontentaj, ĝuis simpatian etoson kaj dankis al Luis Serrano, kiu kun helpantoj sukcesis trovi taŭgan hotelon kaj organizi interesan programon.

Multajn gratulojn al la tuta teamo.

36a BAVELO- 76a regiona **esperanto** Seminario staĝo de *France-Est*

Okazis en Germanio de la 17a ĝis 19a de oktobro 2014
Domo Maria Lindenberg, Sankt Peter

La komuna staĝo de Esperanto-France-Est kaj seminario de Bavelo okazis ĉi-oktobre sur la Nigra Arbaro apud la ubo Sankt-Peter sur monto en tre komforta domo Maria Lindenberg. Krome la vetero estis vere agrabla kaj ni ĝuis la lastajn tagojn de malfrua somero. Ĉirkaŭ la domo aperis mirindaj pejzaĝoj al la Nigra Arbaro kaj pli fore eblis vidi la suprojn de la Vogezaĵ montoj.



En la domo troviĝas komfortaj ĉambroj kun duŝoj kaj necesoj. Ĉe la kvara etaĝo pluraj salonoj estis uzataj por la kursoj, la prelegoj, la libro-servo kaj la knajpo.

La unuaj programeroj estis proponitaj vendrede posttagmeze al la fru-alvenintoj. En la urbeto Sankt Märgen eblis viziti la klostran muzeon pri speciaj horloĝoj de la Nigra Arbaro.

En la vespero ĉiuj partoprenantoj venis al prelego-salono por la bukeda kurso.

Post bonvenigaj vortoj de Alois Eder kaj de Ursula Niessert, estis projekciataj rememorigaj bildoj pri pasint-jaraj renkontiĝoj, staĝoj, seminarioj. Pluraj el tiamaĵ partoprenintoj ankaŭ ĉeestis ĉi-foje.



Sabate matene okazis la diversaj kursoj kaj prelegoj, kiuj iel rilatis al la unua mondmilito. Prelegis Ed Borsboom pri Esperantistoj kaj Esperanto-verkoj "100 jaroj post la Granda Milito". Pastro Eichkorn parolis pri Max Josef Metzger, kiu iĝis pac-aktivisto pro la teruraĵoj de la unua mondmilito.



En la posttagmezo estis proponitaj ekzkursoj piede al la urbeto Sankt Peter aŭ veturado al la lago Titisee. La vetero estis tute agrabla kaj efektive invitis al migrado. (7 km)

Gvidis pastro Eichkorn kun interesaj klarigoj pri la pejzaĝo kaj foraj montoj. En Sankt Peter eblis viziti la klostron kaj la faman klostran bibliotekon. Post reveno jam okazis en la pilgrima preĝejo citro-koncerto fare de citr-orkestro de Badeno-Virtembergo.



Post la vespermanĝo, Jean-Luc Thibias klarigis unue pri la ekesto de la libro-servo de nia ascio "Esperanto-France-Est" kaj parolis pri pluraj novaj libroj eldonitaj en Rusio. En la ampleksa libro-servo, kiun li prozorgis, troviĝis pluraj ekzempleroj de tiuj novaj libroj.



Por la distra parto de la vespero Christoph Frank muzikis per diversaj instrumentoj. Li sukcesis kanti la ĉeestantojn kaj mem kantis laŭ aparta maniere.

La vespero finiĝis en la knajpo, kie kelkaj malfrudormantoj sukcesis libere babili kaj rakonti ŝercojn.

Dimanĉe matene en la bukeda kurso prelegis Edmond Ludwig pri la verko de Raymond Schwartz "Kiel akvo de'l rivero", kiu ja ankaŭ rilatas al la unua mondmilito, ĉefe en la dua parto.

Li detale klarigis kiel la aŭtoro sukcesis emfazi la cirkonstancojn de la romano, kiu disvolviĝis en kamparaj vilaĝoj ĉe la rando de la departemento Mozelo, tiam okupita de Germanio. Pri la situacio de franca junulo, kiu studas en Berlino, kiam ĵus komenciĝas tiu terura milito.

En la dua prelego li montras kiel la limoj inter Francio kaj Germanio evoluis kaj dividas vilaĝojn en la milito-komenco.

Ĉe la tagmanĝo iras multaj gratuloj kaj dankoj al la organizantoj kaj ĉiuj kunhelpantoj por tiu sukcesa kaj interesoplena staĝo. Dankon al ili.



Raporto kaj fotoj de Andreo

Niaj kursoj en Espace 110 kaj en Mulhouse



ESPERANTO

André GROSSMANN

Adultes et adolescents (16 ans et +)

Découvrez une langue vivante pratiquée à travers le monde. Rapidement accessible à tous, précis, nuancé, adaptable aux évolutions des techniques et des pensées, l'Espéranto est un outil d'échange très efficace entre toutes les cultures. Une grammaire sans exception, sans verbe irrégulier. De plus en plus de sites espéranto sur internet, pour apprendre, pour s'informer, pour communiquer et se comprendre.

Mardi : 18h30 à 20h Niveau Avancé

Vendredi : 18h30 à 20h Niveau Débutant

1^{er} contact: Vendredi 19 septembre à 18h30

Début : Mardi 23 septembre

Jen la teksto pri niaj Esperanto-kursoj, kiu aperis en la nova broŝuro de la Kulturdomo Espace 110 en Illzach por la nuna lernojaro 2014/2015.

La kurso por progresantoj jam komenciĝis vendrede la 19an de septembro. Ĝi povas okazi ĉu mardo aŭ vendrede, prefere en la posttagmezo.

Esperanto : initiation

Nouveauté

MULHOUSE

La Maison du Temps Libre

16 rue Engel Dollfus

Lundi 14h30-15h30

La Maison du Temps Libre -

03 89 42 05 24

Animateur(s) : Jacques PINEDA

Inscription : 26€/cycle • Code : M01601

Dume Jacques Pineda sukcesis starigi kurson por komencantoj en "MTL" Maison du Temps Libre en Mulhouse.

Ĝi okazas lunde posttagmeze ekde septembro kun 2 aŭ 3 lernantoj.

En Espace 110 ne venis komencantoj, tial ni planas direkti tiajn lernantojn al la kurso en MTL.

Esperanto en Mulhouse

Jam de 2 jaroj la Domo de la mondĉivitanoj (D.M) decidis pro-

mocii la internacian lingvon. Pro tio ĝi organizas kursojn en siaj lokoj kaj regule elsendas per sia reto dulingvajn informojn. (en tiu asocio mi zorgas pri Esperanto kaj dokumentejoj pri la mondĉivitaneco)

Ĉi-jare mi plezure akompanas du komencantojn sur la vojo al malkovro de Esperanta (studento kaj universitata profesoro) Cetere en la domo de la libera tempo (D.L.T) du freŝaj pensiulinoj faras la saman sperton

Se ĉiuj tiuj gebravuloj plu lernos same kiel ili jam komencis, sendube ili rapide esperantiĝos (lundon je la 14a30 en la D.L.T kaj je la 17a30 en la D.M)

Jacques Pineda

Verdaj fadenoj por amike babili nur en Esperanto



Post la someraj ferioj, la Verdaj fadenoj denove funkcias kaj allogas ankaŭ novajn partoprenantojn el nia departemento, kaj en Saint-Louis ankaŭ el apuda Bazelo.

Jam dufoje ni havis la plezuron akcepti Yann Kerdiles, antaŭa dekanato de la universitato de Mulhouse.

La 27an de oktobro venis eĉ gasto el Strasburgo nome Bernard Reiffsteck.

Kunplezuro, ni eksciis, ke Jacques Pineda sukcesis starigi eĉ 2 Esperanto-kursojn en Mulhouse.

Tiam ni ankaŭ multe diskutis pri estontaj aranĝoj, kiujn niaj membroj aŭdacas iel plani.

La venontaj verdaj fadenoj estas jene planitaj:

24an de novembro en la restoracio "de la Poste" 10 strato de Huningue en Saint Louis

27an de januaro en Mulhouse en la kafejo Le printemps, rue du printemps.

23an de februaro en la restoracio "de la Poste" 10 strato de Huningue en Saint Louis

30an de marto en Mulhouse en la kafejo Le printemps, rue du printemps.

27an de aprilo en la restoracio "de la Poste" 10 strato de Huningue en Saint Louis

18an de majo en Mulhouse en la kafejo Le printemps, rue du printemps.

29an de junio en la restoracio "de la Poste" 10 strato de Huningue en Saint Louis.



Dua festivalo de l'asocio Euro-Afrika Solidareco en Colmar la 11an de oktobro 2014

Bedaŭrindas, ke la ĉefpreleganto pri la lingvo-problemoj en Afriko ne alvenis. Same bedaŭrindis, ke nur deko da neesperantistoj ĉeestis, sed la dua festivalo organizita de Fernando NKANU en Colmar ne malsukcesis.

Ĝi disvolviĝis en belega aŭditorio de la Médiathèque de Colmar, sabate la 11-an de Oktobro 2014. Ne estis antaŭvidebla grava manifestacio en Strasburgo, al kiu estis invititaj la loĝantoj de Alzaco pro la kreo de superregiono Alzaco-Loreno-Ĉampanlando (ĉirkaŭ 15 000 personoj). Unu inter la timoj de la loĝantoj ankaŭ koncernis la regionan lingvon. Fernando sukcesis ĝin aperigi en la regionaj gazetoj.

Tamen la aranĝo sukcesis pro la detala kaj trafa enkonduko de Fernando NKANU. Sekvis ege konvinka prelego de Jacques PINEDA, kiu parolis en la nomo de la Mondcivitanoj. La prezenton de Esperanto kaj de ties solvoj faris mi mem kun la helpo de Roberto KUENY, kiu donis personan noton al la tuto per sia talento de deklamisto. Li ankaŭ tre konvinke parolis pri siaj privojaĝaj spertoj pere de Pasporta Servo. Ne mankis demandoj de la publiko.

Sekvis kuna pritema babilado ĉirkaŭ kafo kaj frandaĵoj proponitaj de bonvolemuloj de la asocio organizinta. Kunlaboris ankaŭ CIMADE (Comité Inter Mouvements auprès des Evacués), ACO (Action Catholique Ouvrière) kaj KEPHAS – Foyers Saint Joseph de Père Etienne en Guinée.

La aranĝo finiĝis per skeĉo prezentinta la prilingvajn malfacilaĵojn de enmigrintoj. Ludis Fernando NKANU kaj tri afrikaj samasocioj. E.L.

#1 Esperanto kaj Fejsbuko / L'espéranto et Facebook

EO — Same kiel aliaj sociaj retoj kiel Ipernity, Fejsbuko havas interfacon en Esperanto. La uzantaro de la Internacia Lingvo povas grupiĝi laŭ intereso, afinecoj aŭ aliaj kriterioj. Tiel, la grupo "Esperanto" havas 14 003 membrojn en multaj landoj. Sufiĉas tajpi "esperanto" en la serĉilo de Fejsbuko por trovi pliajn. Pliaj grupoj (komunumoj) ekzistas ĉe Google+. Jen kelkaj el la aliaj grupoj de Facebook kun la nombro da membroj — Ŝajnas ke ŝerco okupas grandan lokon ! ;-) :

#2 Reta Televido en Esperanto / [Télévision en ligne en espéranto](#) :

La 5an de aprilo 2014, en Sidnejo, Aŭstralio, okazis la lanĉo de reta televidkanalo "**Esperanto-Televido**" — ETV

Aperçu des programmes :

Tempo : [Novaĵoj en Esperanto](#) (Nouvelles en espéranto)

En lien avec un appel de l'ONU : Ne uzu drogaĉojn. [Vivi estas pli bone !](#) (N'utilisez pas de drogues. C'est mieux de vivre !)

Film : "La Giganta Araneo" (L'Araignée géante) de Christopher R. Mihm (2013, 70:30)

Reportage : Verda Stacio prezentas mallongan enrigardon de la [ĉi-jara](#)

kunveno ĉe Ĉantorio (Velká Čantoryje) situanta en nordokcidenta parto de la Slezske Beskides Montaro ĉe la Ceĥa-pola landlimo.

Reportage : Pri la Interlingvistikaj Studoj ĉe UAM, Poznano, Pollando (A propos des Études interlinguistiques à l'UAM — Université Adam Mickiewicz — à Poznan, Pologne).

Reportage : Esperanto-lecionoj ĉe la Lernejo de Bona Volo (Leçons d'espéranto à l'École de la Bonne Volonté, Brésil)
Esperanto en la Gazetaro de Via Regiono

#3 Esperanto-sekcio de WikiTrans / Section d'espéranto de WikiTrans

<http://epo.wikitrans.net/>

EO — 4 343 029 artikoloj aŭtomate tradukitaj el la anglalingva versio de **Wikipedia** aperas nun en la Esperanta sekcio de **WikiTrans**, do 20-oble pli ol en la originala **Esperanto-Vikipedio** (<http://eo.wikipedia.org/wiki/Vikipedio> — 197 721), kaj ofte kun multe pli ampleksaj tekstoj kaj bildaroj. La afero komenciĝis en decembro 2010. Ĉiutage re- aŭ nov-tradukiĝas ĉ. 40 000 artikoloj por certigi aktualecon de la informoj kaj tradukteknologio.

Letero al la legantoj de SRK, kiuj ne konas la LIBROSERVO-n de ESPERANTO-FRANCE-EST

Karaj gelegantoj!

Ĉi-foje mi ne skribas al vi kiel simpla membro de Mulhouse-Espéranto, sed kiel prezidanto de Espéranto France-Est.

Mi deziras informi vin pri fakto, kiu ne estas neglektinda: Espéranto-France-Est posedas LIBROSERVO-n, kiu enviindas eĉ iajn naciajn libroservojn. Ke mi ne troigas, konfirmos al vi la gesamideanoj, kiuj regule partoprenas niajn regionajn internaciajn staĝojn en Alzaco, en Loreno aŭ en Baden Virtembergo. Ja ties prizorganto, Jean-Luc THIBIAS, eĉ laŭnome “ĝisosta esperantisto” (ĉu vi permesas al mi tiun ĉi facilan ŝercon?!!!) postulas de la organizantoj la plej grandan salanon por prezenti sur multnombraj tabloj la riĉan sortimenton. Se iam vi decidus viziti tian aranĝon, vi povos konstati, ke la oferto estas ege abunda, ĝi disponebligas diversnivelajn legaĵojn. Ĝenerale jam haveblas la plej lastaj aperindaĵoj. Ankaŭ varbmaterialon en la franca lingvo haveblas tie.

Ĉio tio por inviti vin al vizitado de la retejoj de nia libroservo ĉe:

<http://esperanto.alsacelorraine.perso.sfr.fr/>

<http://mulhouse.esperanto.free.fr>

Mi ne hezitas reklami pri tiu servo, ĉar neniu inter la responsuloj persone perlaboras monon per ĝi, nek la prizorganto, nek la aŭtoroj, nek la eldonejoj esperantistaj, ĉiuj vendoj ebligas novajn aĉetojn. Sed sciuj, ke nuntempe **ĉiutage aperas libroj en Esperanto**. Zamenhof sciis, ke lingvo, kiu kapablas esprimi ĉiujn nuan-

cojn de la penso, kiuj ja troviĝas en la grava literaturo tutmonda, estas lingvo taŭga por la homaj interrilatoj. Eĉ se Esperanto ankoraŭ ne uzatas en multaj fakoj profesiaj, ĝi delonge pruvis sian efikon sur la kampo de la literaturo.

Iĝu do subtenanto de la plej sukcesa iniciato de la movado: la literaturo. Aĉetante librojn, legante ilin kaj parolante pri ili kun viaj geamikoj, vi helpas al plia prestiĝo por Esperanto.

Edmond LUDWIG
Prezidanto de Espéranto France Est

Partoprenu la 100an UK, Lillo 2015 !

Kara membro, aŭ amiko de Esperanto, Esperanto-parolanto aŭ -subtenanto,

Ĉiujare la plej granda Esperanto-evento de la jaro estas la Universala Kongreso (UK). En 2015 la UK estos des pli ekster-ordinara, ĉar :

- estos la jubilea, 100a UK
- ĝi okazos en Francio ...
- en Lillo, en la sama regiono kiel Bulonjo-ĉe-maro, kie okazis la tut-unua UK, en 1905.
- ĝi kunigos milojn da esperantistoj de la tuta mondo
- estos okazo superi la nombron de partoprenintoj de la lasta UK okazinta en Francio, Montpeliero 1998, kun pli ol 3100 homoj !

Do, rendezuo en Lillo de la 25a de julio ĝis la 1a de aŭgusto 2015.

Bv. rapide aliĝi. La unua aliĝperiodo, kun la plej favoraj prezoj, finiĝos la 31an de decembro 2014.

Aliĝu al la 100a UK Lillo 2015

- Rete al UEA ĉe http://uea.org/kongresoj/uk_alighilo.php, pagante rekte al UEA aŭ tra la landa peranto en Francio, Espéranto-France.
- Sendante la aliĝilon kiu estas en la revuo "Le Monde de l'Espéranto" n-ro 589 al UEA aŭ al la landa peranto en Francio, Espéranto-France.

Eblas pagi la kotizon al Espéranto France ĉeke aŭ ĝire. Kiel membro de UEA, vi ŝparas monon do ne forgesu aliĝi nun...

Informiĝu pri la 100a UK Lillo2015 :

- Vizitu kaj ŝatu la Fejsbukan paĝon lille2015
- Legu la retejon de la LKK Lille2015.fr, kie vi trovos interalie la Unuan Bultenon kaj afiŝon elŝuteblajn.
- Por ĉiaj demandoj kaj rimarkoj, ne hezitu skribi al lille2015@lille2015.fr

Informu samideanojn kaj transdonu tiun mesaĝon, interalie per lokaj diskutlistoj.

La LKK de la 100a UK, Lillo 2015


Nia Kalendaro 2014

| | | |
|------------------------------------|------------------|--|
| novembro 2014 | 7 - 18 - 25 | Kursoj por progresantoj en Espace 110 de la 15a30 ĝis la 17a. Ni kune decidis pri la horoj kaj tagoj. |
| | 3-10-17-24 | Esperanto-kurso por komencantoj en Maison du Temps Libre en Mulhouse lunde de la 14a30 ĝis la 15a30 |
| | 15 - 16 | Bédéciné en Espace 110 de Sabate de 9a ĝis la 18a |
| | 15 - 16 | Dimanĉe de la 9a ĝis la 17a Commerce Equitable en Unghersheim Sabate de la 14a ĝis la 19a Dimanĉe de la 10a ĝis la 19a |
| | 24 | verda fadeno laŭ propono de Jacques de la 19a ĝis la 20a30 en la kafejo Le Printemps: 7 rue du printemps Mulhouse |
| decembro 2014 | 5-12-19 | Kursoj por progresantoj en Espace 110 de la 15a30 ĝis la 17a |
| | 1-8-15 | Eble kurso por komencantoj en Espace 110 de la 18a30 ĝis la 20a |
| | 13 | Zamenhof-festo en Bazelo. |
| | 27 | Internacia Festivalo en Jülich, Germanio |
| Januaro 2015 | 6 - 13 - 20 - 27 | Kursoj por progresantoj en Espace 110 de la 15a30 ĝis la 17 |
| | 5 - 12 - 19 - 26 | Esperanto-kurso por komencantoj en Maison du Temps Libre en Mulhouse lunde de la 14a30 ĝis la 15a30 |
| | 9 | Ni kune festu la 3-reĝojn en Espace 110 de la 18a30 ĝis la 20a. |

Sud-Rejna Kuriero aperas kvaronjare. Ĝin redaktas por Esperanto-Societo Basel: Hanspeter SENN, Paradieshofstr. 164, CH-4054 Basel kaj por Mulhouse-Esperanto: André Grossmann, 5, rue des Pyrénées, FR-68390 Baldersheim. Ĝin eldonas Mulhouse-Esperanto.

Somera oktobro 2014

en Hispanio



kaj en Germanio

